Año XI (N.° 118) Depósito Legal V. 809-1959

# Boletín


DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

Núm. 6

NOVIEMBRE DICIEMBRE 1959

Marqués de Caro, 6

VALENCIA (ESPAÑA)




## HACE CIEN AÑOS QUE NACIÓ EL

# DR. L. L. ZAMENHOF

**La conmemoración del primer centenario del nacimiento del Doctor Zamenhof, genial creador del Esperanto, se ha caracterizado por la tributación, en los cinco continentes, de merecidísimos homenajes al sabio, al filántropo, al hombre de corazón.**

**Los esperantistas españoles no han quedado a la zaga en esta noble pugna. Artículos periodísticos, emisiones radiofónicas, veladas literarias y conferencias han ido en paralelo con los descubrimientos de lápidas y rotulaciones de calles y plazas... El extraordinario éxito del congreso de Málaga ha sido el cenit de nuestra contribución a ese homenaje, que no es sino la expresión del profundo agradecimiento que todos los esperantistas tienen por el valioso legado cultural que Zamenhof les hizo, también para el bien de todos.**

**En esta fecha, en que aparece en su justa medida la figura del sabio lingüista y generoso filántropo, comprobamos, una vez más, la talla gigantesca del hombre excepcional, que creó el Esperanto. Y, para mejor enaltecerle, hagamos de nuestro entusiasmo, de nuestra inquebrantable voluntad de triunfo y de nuestra incondicional colaboración a su gran obra, el más alto y sólido pedestal para su egregia figura, poderosa luminaria que ha de brillar, como pocas, sobre los prometedores horizontes del futuro...**

---

«Ĉiufoje, kiam komenciĝas nova interkongresa jaro, ĉiu esperantisto, kiu antaŭvidas por siiom da libera tempo kaj povas ŝpari iom da mono, komencas prepariĝadi al la kongreso. Amikoj, kiujn ligas la sama ideo, la samaj aspiroj kaj esperoj, kortusite diris al si reciproke: «ĝis la revido», kaj kun ĝojo ili atendis tiun revidon. Kiel reciproke sin amantaj gefratoj, kiuj nur de tempo al tempo povas kuniĝi en la domo de siaj gepatroj, tiel la esperantistoj sopire atendas tiun momenton, kiam ili povos renkontiĝi en la centro de Esperantujo, ame saluti sin reciproke, varme premi al si la manojn kaj diri al si: «ni vivas, ni honeste laboris en la daŭro de la jaro, ni gardis honeste la honoron de nia domo, ni povas kun pura konscienco partopreni en la komuna festo de nia familio».

Mi atentigas vin pri la granda simpatio, kiun montris al nia afero la registoj de tiu lando, en kiu ni nun troviĝas; ne sole ĉiuj ministroj prenis sur sin la patronecon de nia kongreso, sed la Registaro de la lando, en sia propra nomo, per siaj ambasadoroj, oficiale invitis la registarojn de aliaj landoj, ke ili sendu delegitojn al nia kongreso.

Mi esprimas en via nomo plej varman dankon al la Registaro de la hispana Regno».

**El la parolado de D-ro Zamenhof, dum la 5.ª Universala Kongreso en Barcelono (Septembro 1909)**

# NOTOJ PRI LA VIZITO DE D-RO ZAMENHOF AL VALENCIO

***Rememore al la Postkongreso, okazinta kiel sekvo de la V^a Universala Kongreso en Barcelono, ĝuste antaŭ kvindek jaroj (Septembro 1909) ni kompilas ĉi tiujn notojn el la tiutempa gazeto «La Suno Hispana» kaj ili kompletigas la raportojn, kiuj jam aperis en niaj antaŭaj numeroj, kiel intima omaĝo de la hispana esperantistaro al D-ro Zamenhof, en lia jubilea jaro.*** —REDAKCIO

**Mardo.** — 14. Septembro. Kiam la alvena horo alproksimiĝis, la ĉirkaŭaĵo de la Norda stacidomo, prezentis aspekton de la gravaj festotagoj. Multaj personoj sin direktis tien, por akcepti la ekskursantojn; multaj veturiloj atendis ekstere kaj popolamaso alkuris scivoleme por alesti kaj partopreni en la okazaĵo.

Nur kelkaj minutoj mankis por la alveno de la ekspresa vagonaro, kaj en la tuta stacidomo ne estis sufiĉa loko por enteni tiom da publiko. Tie estis la urbestro, S-ro Pedro Aliaga, kun urbkonsilantoj kaj la Prezidanto de la Komitato por la Regiona Ekspozicio, S-ro Trenor, kun pluraj komitatanoj. Krome, ĉeestis ĉiuj urbaj esperantistoj, kun multaj aliaj el diversaj urboj kaj vilaĝoj de la regiono.

Granda aplaŭdado sonis, kiam la vagonaro alvenis. La urba muzikistaro aŭdigis «La Espero»n, kiun ĥore oni kunkantis kaj oni finis per krioj: «Vivu Zamenhof!», «Vivu Esperanto!» D-ro Zamenhof desaltis de la vagonaro kun sia edzino, kiu ricevis florbukedon de la urbestro, al kiu oni faris la prezentojn, ĉar inter la alvenintoj, krom nia Majstro, troviĝis eminentuloj, kiel la generalo Sebert, S-ro Moscheles, S-ro Bourlet, konata direktoro de «La Revuo», S-ro Barono de Menil kaj multaj aliaj.

Kiam la prezentoj estis faritaj, meze de entuziasmo, la ekskursantoj eliris el la stacidomo kaj sin direktis al la veturiloj. La publiko, kiu atendis ekstere, akceptis per tre longa aplaŭdado la aperon de D-ro Zamenhof, ĝis la amaso da veturiloj komencis iri inter vicoj da personoj, kiuj sur la trotuaroj kaj eĉ en la strato mem partoprenis la esperantistan feston.

Dum la veturiloj marŝas, la publiko varme aplaŭdas. Multaj personoj sin montras ĉe la balkonoj, por vidi la spektaklon; kaj, kiam la fiakro de D-ro Zamenhof haltas antaŭ *Palace Hôtel*, kie li devas loĝi, la luksa strato de la Paco aspektas impone. D-ro Zamenhof devas sin montri al la publiko, ĉe la balkono, por akcepti novajn aklamojn. Ambaŭflanke de la balkono, pendas vertikale du belegaj tapiŝoj el floroj, sur kiuj tekstas du surskriboj: «Vivu Zamenhof», «Vivu Esperanto».

Post kelkhora paŭzo, por la vespermanĝo, okazis solene la Malfermo de la Postkongreso en la belega salono de la Ekspozicio, kies brila lumo kompletigis la belecon de tiom multaj sinjorinoj kaj fraŭlinoj, kiuj sidis en la loĝioj. Ceteraj seĝoj estis plenokupataj de samideanoj kaj personoj, kiuj scivoleme venis por alesti en la festo. Tial, en la Teatro estis neniu libera sidloko. Kun ĉeesto de la urbaj aŭtoritatoj kaj gravuloj de nia Movado, sub prezido de D-ro Zamenhof, la festo komenciĝis por la Ekspozicia Himno (*), kiun majstre ludis la urba muzikistaro kaj bele kantis la ĥoroj de du plej gravaj popolaj societoj «Vega» kaj «Micalet».

Post tiu muzika enkonduko, S-ro V. Inglada, Prezidanto de la Valencia Grupo, faris la oficialan saluton kaj emfazis la mirindajn ecojn de nia lingvo kaj la fervoran dudekdu-jaran agadon de la esperantistoj. *«Ciujare* —li diris— *la nacioj disputas inter si la honoron gastigi la kongresanojn de Esperanto; en la nuna jaro, ĉi tiu alta honoro estas difinita al Hispanujo. Tial, ĵus okazis la 5.^a Kongreso en Barcelono, kie ĉiuj urbanoj konkuris por regali niajn samideanojn. Ili troviĝas nun en Valencio; ili estas hodiaŭ niaj gastoj. Mi ne dubas —ĉar dubi tion estus vin ofendi— ke ĉi tie ili estos same afable akceptataj, ke tiu nova sento, kiu venis en la mondon, regas ankaŭ en la koro de ĉiuj valencianoj, por ke la esperantistoj trovu familian hejmon en nia bela gastama urbo, kiun oni prave nomas centro de kulturo, urbo de la floroj, kaj ĝardeno de Hispanujo»*.

Kiam finiĝas la longedaŭra aplaŭdado, kiu premias la paroladon, S-ro Trenor, Prezidanto de la Ekspozicia Komitato, elokvente salutas D-ron Zamenhof kaj ĉiujn gekongresanojn. S-ro Ayza tradukis. Tuj poste, la urbestro, S-ro Pedro Aliaga en paroladeto, kiun tradukis S-ro Marzal, deziris agrablan restadon en la urbo.

Poste, li salutis respekte nian karan Majstron, dirante, ke lia nomo pasos al la Historio inter tiuj de la personoj, kiuj plej grandajn servojn faris al la homaro. Li aldonis, ke la Valencia urbokonsilantaro

(*) Nun oficiala himno de la Valencia Regiono.

estas la unua en Hispanujo, kiu oficiale subtenis Esperanton, kio estas efektiva voĉdono, kiun aliaj korporacioj sekvos.

Granda entuziasmo kaj forta emocio regis en la salono, kiam D-ro Zamenhof sin levis por paroli. Per belaj kaj elegantaj frazoj, nia Majstro plektis saluton al la Urbestro, al la Ekspozicia Komitato kaj al la Valencia popolo, dankante pro la afabla akcepto, kiun ili ĵus al li faris.

Ĉiam inter aplaŭdoj, D-ro Zamenhof daŭrigis, dirante, ke kiam en Dresdeno oni decidis pasintjare aranĝi la 5-an Kongreson en Hispanujo, multaj opiniis, ke ne estis ankoraŭ ĝusta tempo por kongresi en nia lando. Sed, veninte en Barcelonon kaj spertinte la grandan sukceson de la 5.ª, ĉiuj konstatis, ke la realo superis la esperojn.

Ankaŭ, kiam oni decidis organizi Post-Kongreson en Valencio, ŝajne oni kredis en la unua momento, ke ĝi estus nur ia sengrava aldono, sed plej konstateble estas nun, ke ĉi tiu *aldono* estas eksterordinara festo kaj fruktoporta ago per la venko de nia idealo. Li finas per laŭdoj al Valencio, kies nomo, kvankam jam bone konata de ĉiuj eksterlandaj kongresanoj, fariĝos ankoraŭ pli glora dank' al ĝia mirinda Ekspozicio kaj al brila Postkongreso.

Kiam D-ro Zamenhof sidiĝis, aplaŭdoj ege tondris kaj la entuziasmo elbordiĝis: ĉar la publiko deziris koni la enhavon de la tuta parolado, S-ro Inglada lerte ĝin tradukis kaj vivigis denove aplaŭdojn.

Fine, oni ludis kaj kantis denove «La Espero»n kun sama fervoro kaj entuziasmo. Poste, la esperantistoj promenis tra la Ekspozicio kaj alestis en la prezentado de opero «Aida», ĉe Teatro-Cirko.

**Merkredo** — 15ª Septembro. Matene, la ekskursantoj vizitis la urbajn vidindaĵojn kaj la havenon. D-ro Zamenhof, kun generalo Sébert kaj S-roj Ayza, Inglada kaj urbokonsilanto, D-ro Aguilar Blanch, faris oficialan viziton al la aŭtoritatoj: Regiona Ĉefgeneralo, Provincestro kaj Urbestro. Ankaŭ li faris viziton al Muzeo Paleontologia kaj al la Konservatorio.

Posttagmeze, en grupetoj, oni vizitis la palacojn kaj diversajn instalaĵojn de la Ekspozicio kaj oni faris kolektivan fotografaĵon. Je la sepa kaj duono, en la granda salono, komenciĝis la Postkongresa Kunveno, kiun malfermis D-ro Aguilar Blanch, dirante, ke temas nur pri intima renkontiĝo, por konvinki la publikon pri la komprenebleco de Esperanto. S-ro Inglada raportis pri la aliĝoj kaj legis telegramojn kaj leterojn, inter ili unu tre interesa, ĉar S-ro R. Codorniu informas, ke la Registaro nomos D-ron Zamenhof Komandoro de la Ordeno de Elizabeto, la Katolika.

Sekvis salutaj paroladetoj de landaj kaj eksterlandaj reprezentantoj: S-ro Ferri, dalmato, la ĉarma fraŭlino Julia Lacruz, S-ro Carlo Bourlet, elstara oratoro, la Pastro Guinart, modesta sed kompetenta kaj tre fervora pioniro, kiu enkondukis unue Esperanton en Valencio, D-ro Mibs, prezidinto de la pasintjara Kongreso en Dresdeno, la aroga kapitano. Perogordo, hispana pioniro de la aerveturado, kiu meritas diplomon, kiel propagandisto en la aero, ĉar, flugante per aerostato, parolis en Esperanto kun alia kolego, kiu veturis proksime per alia aerostato. S-ro Douglas salutis nome de la irlandoj kaj S-ro Tellini, nome de la italaj esperantistoj. S-ro Alfonso Sabadell, vicprezidanto de la 5.ª Kongreso en Barcelono, salutis nome de la katalunaj samideanoj. S-ro Inglada resumis la salutojn, je nomo de la Valencia rondo, kaj spontane laŭtigis improvizitan versaĵon, laŭ jena komenco:

*En urb' de la floroj, per lingvo Esperanto,*
*Regadas nun vera konsento,*
*La homoj kunvivas, kredante sin fratoj,*
*Dum korojn batigas amsento.*

Impona silento sekvis la aplaŭdojn, ĉar D-ro Zamenhof ekstaris por paroli, kaj neniu volas perdi eĉ unu solan vorton. Nia Majstro, per sia harmonia voĉo. kiu ŝajnas al aŭdanto karesa apudmara venteto, faris paroladon, kies plena enhavo estas malfacile reproduktebla; kapti lian oran esprimon estas afero tiel neebla, kiel voli tuŝi la lunon per la fingroj. Lia parolado estis varma saluto kaj emocia danko al la tuta Valencia popolo kaj al ĝiaj aŭtoritatoj, kun mencio al Lia Reĝa Moŝto, Alfonso XIIIª.

Farante aludon pri konata persono, kiu dubis, ĉu diverslingvaj esperantistoj povas perfekte sin interkompreni, li diras, ke tiu persono tuj forĵetus siajn dubojn kaj kredus al nia lingvo, se li ĉeestus inter ni, en ĉi tiu salono. Li do multe esperas de ĉi tiu fruktodona Postkongreso, esprimante per belegaj frazoj la agrablajn impresojn ricevitajn dum lia restado en Barcelono kaj Valencio. La salono resonas pro la bruo de l' aplaŭdoj. S-ro Aguilar Blanch fermas la kunsidon, sed la publiko ne estas preta

foriri; mankas io, kio ĉiam aldoniĝas al nia programoj: kantado de «La Espero»!

Ĉiuj staris do kaj fervore kantis, lerte direktataj de S-ro De Menil, kiu sukcesis, kiel kompetenta orkestrestro, ke la ĥora kantado estu agorde farita. Vespere okazis prezentado de opero «La Boheme» kaj estis anoncite la bruligo de artofajraĵoj kun esperantaj surskriboj. Bedaŭrinde, pluva vetero malebligis ĉi tiun programeron.

**Ĵaŭdo** — 16. Septembro. Ĉi tiun tagon oni dediĉis por fari ekskurson al Sagunto, historia urbo, kun valoraj restaĵoj de fama greka kolonio. Vizitante la ruinojn de la kastelo, kvin gekongresanoj suferis akcidenton, ĉar parto de la remparo falis sur ilin. Tute akurate alvenis urbaj elementoj de la Ruĝa Kruco kun kuracisto, kiu pere de traduko de kapitano Perogordo aranĝis la aferon, pri kies Esperanto-servo oni oficiale raportis. La akcidento, cetere ne estis grava, ĉar fakte estis unu sola vundito.

En la sama tago, D-ro Zamenhof ricevis peton fari operacion al malsanulo je la okuloj. D-ro Zamenhof troviĝis vere en tre embarasa situacio, ĉar li ne disponis je la adekvata ĉambro nek je la instrumentoj necesaj. Sed, D-ro Aguilar Blanch, ankaŭ okulisto, proponis sian ĉambron kaj ilojn al nia Majstro, kiu tiam, helpata de li, faris tre sukcese la petitan operacion. Kvankam D-ro Zamenhof ne volis ricevi honorarion, pro insista peto, li devis ĝin akcepti, sed li tuj ĝin donacis al la Valencia Grupo.

Vespere, en la Urba Palaco de la Ekspozicio, la Urbestraro oferis lunĉon, kaj en la balsalono de la Granda Kazino okazis vigla balo, kun ĝoja partopreno.

**Vendredo** — 17. Septembro. Jen la tago de foriro! Ĉiuj estas ĉagrenitaj pro la disiĝo, ĉar oni kutimiĝis vivi kun la samideanoj, kvazaŭ en familio. En la Norda stacidomo, je la naŭa matene, oni estas atendantaj la vagonaron. La valencianoj adiaŭas ĉiujn kun bedaŭro. La forira signalo tuj eksonos; ĉiuj manprenas unu la alian, oni aŭdas vivuojn; kaj... lastan fojon oni kantas «La Espero»n, dum la vagonaro ekiras majeste, senbrue, forportante tiom da karaj geamikoj. Tiam, S-ino Klara, la edzino de D-ro Zamenhof, ĵetas el sia vagonfenestro rozon al S-ro Inglada, kiu kaptas kaj tenas ĝin, sentante el malproksime la delikatan kanton de la poetino:

*«Rozujo sovaĝa, simbolo de l' Amo»...*

JUNULARA RUBRIKO

## HAZARDA OKAZINTAĴO

En tago de pasinta Julio, okazis al nia aktiva HEJS-kunlaboranto, S-ano Miguel Meseguer, hazardaĵo, kiu unu fojon pli taŭgis por pruvi la utilon de Esperanto, antaŭ la okuloj de personoj, ankoraŭ ne konvinkitaj aŭ kontraŭaj al nia ideo.

Tiu amiko revenis per vagonaro, el Benicarló al Barcelono. En la sama vagono, dekomence, estis, kiel kunvojaĝantoj, du hispanaj sinjoroj. En Vinaroz eniris en la vagonon tri junaj nederlandanoj, el kiuj du estis gefianĉoj. Kompreneble, ili parolis inter si, dirante nenion al la hispanoj, pro manko de interkompreneblECO.

Unu el la hispanoj ekdiris:

—Ja estas bedaŭrinda la neekzisto de lingvo komprenebla por la tuta mondo. Nun mem, ni troviĝas antaŭ ĉi tiuj eksterlandanoj, kiuj estas similuloj niaj, kaj pro la fakto, ke ili naskiĝis kaj loĝas en alia lando, ni ne povas paroli kun ili.

Nia amiko ne povis silenti kaj ekdiris:

—Tamen, tiu lingvo ekzistas!

Alia el la tri hispanoj, kiu ĝis nun silentis, mokdemandis kaj ekdiris:

—Ah! jes, Esperanto; sed... kiu parolas ĝin?, neniu! Por kio ĝi taŭgas?, por nenio!

—Sinjoro, vi tute eraras. Ekzistas multaj esperantistoj en la mondo, kaj ili ĉiuj tre bone interkompreniĝas.

Aŭdinte la vorton Esperanto, subite, unu el la nederlandanoj diris:

—Ĉu iu el vi estas esperantisto?

S-ano Meseguer respondis duonbalbute:

—Jes... Mi parolas iomete.

Granda ĝojo por la nederlandanoj!

Permesu al mi klarigi, ke S-ano Meseguer, malgraŭ sia amo al nia idealo kaj malgraŭ sia sufiĉa kono de la lingvo, kiun li lernis en Instituto de Esperanto en Barcelono, restis iomete timema por paroli; sed, tiun tagon, ĉu pro la emocio troviĝi sola antaŭ eksterlandaj esperantistoj, ĉu por konvinki la skeptikulojn, komencis paroli, balbute la unuajn vortojn, sed flue kaj senerare la ceterajn. Li rakontis al la nederlandaj samideanoj la tutan okazaĵon. Vigla esperanta interparolado daŭris ĝis Tarragona, kie la eksterlandanoj forlasis la vagonon, post konkreta pruvo, pri la ebla uzado de Esperanto por ĉiuj temoj, antaŭ personoj ankoraŭ nekonvinkitaj. Certe, tiuj du hispanoj neniel plu parolos malfavore pri Esperanto; male, en oportuna okazo, ili bone memoros ĉi tiun anekdoton.

Pere JULIÁ (Barcelono)

## SONORIGADO SEN SONORILOJ

**ORIGINALA INVENTO DE HISPANA ESPERANTISTO**

Post kelkaj jaroj da obstina konstanta laboro, S-ro Ernesto Pérez, kompetenta horloĝisto kaj malnova samideano el la Valencia rondo, sukcesis aliformigi radikale la dum longaj jarcentoj sistemon por sonorigado en la sonorilturoj.

Ĝis nun, kiel oni bone scias, la sonorilojn oni movis per ŝnuroj, per manoj aŭ per elektraj motoroj. Ĉi tiu lasta rimedo estas tre monotona. La aŭdaca elpensaĵo de nia samideano konsistas el lerta aranĝo de diversaj pecoj en originala meĥanismo. Kvankam, supre de turo, sonas sonorado klare, kiel tiu de la ĝis nun konataj sonoriloj, ili ne estas bezonataj por tio, ĉar anstataŭ ili, alte en la sonorilejo, funkcias nur kvar laŭtparoliloj kaj mezgranda ŝranko, kun malgranda aparato, en la sakristio.

Por sonorigi la sonorilojn, laŭ diversaj vokoj al piuloj, por la meso aŭ enterigoj, same kiel por solenaj ceremonioj dum gajaj festotagoj, oni bezonas nur tuŝi malgrandan levilon, je longeco de kvin centimetroj, kaj tuj sonoras alte en la turo la laŭtaj bronzaj voĉoj de la koncernaj sonoriloj, grandaj aŭ malgrandaj.

Estu dirite, antaŭ ol pri tio oni sin demandu, ke tiu eksterordinara aparato NE produktas sian klaran sonoradon per gramofondiskoj. La plej rimarkinda kvalito de tiel nova sistemo estas ĝia grandega ekonomio, ĉar kvankam la nombro da sonoriloj aŭdeblaj povas esti eĉ duobla ol nun, la kosto reprezentas tamen 75 % malpli ol la nunaj ordinaraj kostoj. Cetere, oni devas ankaŭ kalkuli je la avantaĝo de nenia elspezo por salajro de sonorigisto, ĉar fakte neniu profesia prizorganto estas necesa por regula kaj bonorda aŭdebleco kaj funkciado de tiu aparato.

Tiel reala estas la sonorado de la novaj «sonoriloj», ke, se la aŭskultantoj scias nenion pri la nova sistemo, certe ĉiuj kredas, ke la sonojn eligas aŭtentikaj sonoriloj. La laŭtparoliloj ne estas videblaj, ĉar en la fenestroj de la koncerna turo, estas arte instalitaj feraj aŭ lignaj kovriloj, tra kiuj oni bonege aŭdas la klarajn sonojn de tiuj modernaj kaj mirindaj «sonoriloj», pacience kreitaj de nia samideano.

**Apartajn detalojn kaj klarigojn oni povas rekte peti al S-ro Ernesto Pérez**
**Calle de Serranos, n.° 1 — VALENCIA**

## INAŬGURO DE NOMTABULO POR ZAMENHOF-STRATO EN CHESTE

Cheste, la famkonata vilaĝo, en la Valencia provinco, kie Esperanto estas speco de urba fierindaĵo, ne volis resti flanke de la omaĝo, kiun pluraj hispanaj urboj dediĉas nun al D-ro Zamenhof, en la kulmina momento ĉe la fino de lia centjara Jubileo.

Sabate, 24an de Oktobro, kiel plej rimarkinda soleno, en la kadro de la vilaĝaj festoj, okazis la inaŭguro de bela marmora tabulo, kiu donas nomon de nia Majstro al plaĉa strato de la urbeto. Por partopreni la ceremonion venis de Zaragozo S-ro F. Máñez, la senlaca pioniro, kiu dum jardekoj, ne nur plugis la kampojn, sed ankaŭ la mensojn de siaj samvilaĝanoj, instruante la gramatikajn regulojn kaj la honestajn ideojn de la Esperantismo.

Kune kun li venis lia edzino, la simpatia V. Bueno, kaj la bravaj aktivulinoj el Zaragozo, F-inoj Emilia kaj Inés Gastón, filinoj de karmemora S-ro Emilio Gastón, fondinta antaŭ kvindek-unu jaroj la Grupon «Frateco». Ilia ĉeesto pligravigis la aranĝon.


Sekvata de la urba muzikistaro, ekmarŝis multenombra manifestacio, prezidata de civila kaj eklezia aŭtoritatoj, ĝis la elektita strato. Tie, sur tribuno, la urbestro, S-ro V. Verduch, alparolis la publikon kaj detiris la kurteneton, kiu kovris la tabulon, dum muzikistoj ludis la nacian himnon. Tuj poste, D-ro R. Herrero, kiel Prezidanto de nia Federacio, elokvente salutis kaj instigis al daŭra senĉesa agado por ke Cheste ne perdu la prestiĝon de tutmondeco kaj popola klereco, kiun plenmerite ĝi gajnis dank' al Esperanto.

Poste, en la salono de la Urbodomo, la tuta ĉeestantaro estis ĝentile regalata per franda lunĉo, kiu bone utilis por firme ligi la sentojn de novaj kaj malnovaj samideanoj. Ĉe la fino, oni improvizis specon de oratora turniro, en kiu oportune intervenis, inter aliaj, F-ino Inés Gastón, S-ro Máñez kaj Luis Hernandez. Cetere, D-ro E. Tudela, profitis la tempon por prezenti la unuajn ekzemplerojn de sia ĵus aperinta Esperanto-Hispana Vortaro.

---

**Honorado al nomo de homo postulas privatan oferon al lia verko!**

# VOJAĜO AL MARO GALILEA, EN ISRAELO



Karaj amikoj! Mia edzo estas hodiaŭ en Tel-Aviv. Estas malofta okazo, ke la skribmaŝino estas libera, kiel same ankaŭ mi estas libera. Mi uzas la okazon kaj volas rakonti al vi pri vojaĝo, kiun mi faris antaŭ ne longe tra fama kaj bela parto de Israelo. La ekskurson aranĝis Organizo de laborantaj patrinoj; tial, nur virinoj povis ĝin partopreni. Prezentiĝis do al mi okazo tute eksterordinara, pasigi kelkajn tagojn ĉe la bordo de Lago Kineret, kiun oni tra la mondo nomas Lago Tiberias, sed ankaŭ, laŭ la Biblio, Maro Galilea. Ni sidiĝis en luksa aŭtobuso. En Israelo estas malmultaj fervojlinioj, kaj preskaŭ ekskluziva transportrimedo estas aŭtobusoj. Se ilia celo estas malproksima, oni ne vendas pli da biletoj ol disponeblaj sidlokoj. Ni sidis do komforte, kaj kun ĝuo ni observis la bildon, kiu pasis preter niaj okuloj.

Ĉe ni estas nur glataj asfaltaj ŝoseoj; tial, vere, ni veturis kvazaŭ envolvitaj en kusenoj.

Nia direkto estis okcidenten de Haifa. Traveturinte la valon Galilean, mi konvinkiĝis, ke tute prave oni nomas ĝin unu el la plej allogaj regionoj de Israelo. Karesis la okulojn verdaj kampoj kaj grandegaj plantejoj de oranĝarboj, plenaj de oraj fruktoj; inter ili, rozkoloraj burĝonoj, promesantaj novan rikolton. Tra la malfermitaj fenestroj, ni flaras ilian dolĉan odoron. Laŭlonge de la oranĝaj ĝardenoj, staras densaj vicoj da cipresoj, kiuj gardas ilin kontraŭ ŝtormoj kaj orientaj ventegoj (ĥamsinoj). Subite, jen ankaŭ vastegaj plantejoj de bananujoj kaj grupoj de sveltaj palmoj. Denove, fekundaj kampoj, ĉiam sate verdaj, kvankam ilia verdo estas hela; sed ĉio estas bonvena al miaj okuloj, iom lacaj de flavkolora sablo, ĉirkaŭanta mian hejmon. La aŭtobuso komencas grimpi supren kaj malfermas daŭre novajn kaj surprizajn panoramojn. Jam supre, super ĉio, jen la majesta monto Hermon, brilanta kun sia neĝa kapo kaj kun siaj neĝokovritaj deklivoj.

Iam venadis en tiujn montojn loĝantoj de tuta Palestino, se ili emis spiri montaran aeron kaj eventuale ĝui vintran sporton. Nia vojo kondukas nin al Nazaret, urbo de Jesuo, loko, kiun mi kun ekscito atendas. Kaj... jen ĝi! Ni alvenas ĝuste en ĝian antikvan parton, kies mallarĝaj stratetoj sin malfermas al ni, kun siaj ŝtonaj dometoj, kelkaj preskaŭ disfalantaj. Bone mi povas imagi tiun lokon, kiel scenejon de bibliaj okazintaĵoj kaj prezenti al mi, ke Kristo paŝis tra ĉi tiuj stratoj. Ekde tiu tempo, certe, ankaŭ restis senŝanĝaj la ĉirkaŭaj deklivoj, plenaj de ŝtonoj kaj sovaĝaj kaktoj. Inter ili, ŝafoj serĉas nun, kiel antaŭ miljaroj, la maloftan herbon. La loĝantaro estas nun plejparte araba. Multaj infanoj, ŝajne ĉiuj malpuraj, svarmas ekstere. Neniel mi povas kredi, ke, eĉ en tiuj antikvaj tempoj, estis la dometoj tiel plenaj de infanoj same nezorgataj. Sed, kiam mi vidas virojn kaj virinojn vestitajn en simpla blanko, kun kapoj ĉirkaŭvolvitaj per sama ŝtofo, aŭ arabinon kun akvokruĉo surkape, mi havas denove antaŭ mi bildon el epokoj antikvaj, el la Biblio, kaj mi forgesas ĉion malpuran, ĵus antaŭe viditan... Plena de emocio, mi forlasas Nazareton; daŭras mia kortuŝ,o kaj denove jen mi sentas min en epoko biblia. Trafas miajn okulojn la surskribo: «Kfar Kana» (Vilaĝo Kana). Kana?... ĉar ni estas en Galileo, do «Kana Galilea»; profunde skuita, mi rememoras, ke mi estas en loko, pri kiu rakontas la Nova Testamento; ĝi diras, ke en Kana ŝanĝis Jesuo akvon en vinon por ebligi al malriĉuloj konvenan festadon ĉe geedziĝo. Mi dankas Dion, ke li venigis min en ĉi tiun lokon de malnova historio, kiu reaperas nun antaŭ mia spirito, ĉar Kana restas fidela al sia tradicio.

Laŭ antikva kruĉo, kiun oni tie elfosis, oni intencas fari precizajn kopiojn el bakita argilo, oni verŝas en ilin vinon, ankaŭ kulturitan en Kana, kaj oni vendas tiujn kruĉojn, sigelitaj, al alvenantaj gastoj. Mi scias, ke oni povas nomi tion profanado; sed, ankaŭ oni povas konsideri tion, konvenan rememorigon de ĉarma miraklo.

Ankoraŭ mi ne rekonsciiĝis de tiaj impresoj, kiam atakas min la parfumo de novaj mirakloj. Brilas antaŭ mi la konstruaĵoj de banloko Tiberias, kun rave bela surfaco de verde-blua lago. Jen antikva loko, el tempo de Romanoj, en nova blanka brilo, kadrita en verdo de arboj kaj de florriĉaj herbejoj. Super la varmaj kuracaj fontoj leviĝas vaporo, dum ĉirkaŭe promenas elegantaj bangastoj. Tamen, ne kredu, ke kuracado en Tiberias estas privilegio de riĉuloj. Tie, estas zorge flegataj ankaŭ laboristoj kaj simplaj homoj, senditaj tien de malsanul-asekurejoj. Kun bedaŭro, mi forlasas la pitoreskan Tiberias, ĉar nia celo kuŝas iom pli malproksime. Ankoraŭ dudek minutojn da aŭtobusa veturo, kaj ni haltas

definitive. En tiu momento preskaŭ ĉesas mia spiro; mi frotas insiste miajn okulojn...

Ĉu mi alvenis en paradizon? La tuta belo, kiun mi jam vidis en ĉi tiu lando, montriĝas al mi kunigita en ĉi tiu edeno, kie mi pasigos kelkajn tagojn. Dio, kiom da mirindaĵoj vi kreis, kaj kiel lerta estas la homa mano, scianta ilin zorgi kaj konservi! Sur bordo de fabela lago, etendiĝas antaŭ mi la plej ĉarma ĝardeno, kiun oni povas imagi. Ĉe la horizonto, jen Hermon, kun neĝokovritaj flankoj; ĉe alia bordo, dise montriĝas kelkaj brilantaj punktoj: la lastaj sidejoj sur israela teritorio. La loga surfaco ondas milde, dum aŭdiĝas trankvila plaŭdo. Ĉirkaŭe staras ĉefa konstruaĵo —vera kastelo!— Tie kaj ĉi tie, malgrandaj pavilonoj, kien oni nin loĝigas. Mi tuj malfermas la fenestron de mia ĉambro, kaj envolvas min la agrabla odoro de violoj, bluantaj sur larĝa bedo, sub mia fenestro. Baldaŭ oni kondukas nin en alian domon, kiu estos nia manĝejo. Tie, ni ricevas riĉan kaj bongustan vegetaran manĝon. Poste, ni alvenas en centran konstruaĵon, kie al ni, novaj enmigrintoj en Israelon, oni parolos pri la lando kaj ĝiaj problemoj. Tie estas ankaŭ legejo, kun granda biblioteko, kie abundas ĉiuspecaj gazetoj kaj revuoj je nia dispono. Mi aŭskultas la unuan paroladon en vasta halo, kiun ĉirkaŭas kolonoj kovritaj de hedero.

Ĝia ilumino estas sagace aranĝita, kun tre delikata gusto. Oni rakontas al ni pri la loko kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, kiun ni vidos en proksimaj tagoj. Matene, milda suno vekas nin tra la fenestroj. Ne estus tiel, post ses aŭ ok semajnoj, ĉar tiam ekregos ĉi tie arda varmo. Ni estas tro proksime de la Araba dezerto, kaj eble ankaŭ efikas la situo de la loko. Lago Kineret kuŝas ducent metrojn, sub nivelo de Mediteranea maro. Nun, la vetero tamen estas plej imageble agrabla. Ni eksidas en motorboatoj, kaj ni direktas nin al alia bordo de Kineret, ĝis la afabla vilaĝo Ejn Gev, kiun neklare ni vidis en pasinta vespero. En Ejn Gev okazas ĉiujare koncertoj, kiuj estas famaj tra la tuta lando kaj amase vizitataj de israelaj muzikamantoj. Mia raporto iĝus senfina, se mi volus iom detale rakonti pri ĉio, kion mi vidis; cetere, nura cito de loknomoj ne dirus multon. Mi volas tamen mencii la antikvajn elfosaĵojn en apuda proksimo de nia sidejo. Tie, estis malkovritaj pavimitaj stratoj, putoj kaj aliaj restaĵoj de interesa loko, kiu, laŭ opinio de fakuloj, estis konstruita antaŭ proksimume kvar mil jaroj. Kelkajn vortojn mi devas diri krome pri nia vizito al *Kibuco* Degania, kuŝanta je distanco de dudek minutoj en facila promeno. Por tiuj, kiuj ne scias, kio estas kibuco, mi faras klarigon: kibuco estas vilaĝo, kies loĝantoj elektis, kiel idealon de sia vivo, komunan laboron por komuna celo. Pioniroj, dediĉintaj sin komplete al la sankta tasko rekrei sian malnovan patrujon, fondis en lokaj, iam ŝajne neloĝeblaj, tiujn vilaĝojn kaj faris el ili modelajn centrojn, por montri al la cetera mondo, kio estas atingebla per obstina diligento, forta volo kaj senŝancela entuziasmo.

Degania estas unu el la plej malnovaj kibucoj; fondita en 1909, ĝi estas hodiaŭ feliĉa civito kun kelkcentoj da loĝantoj. Ĉiu el ili vivas en komforta loĝejo. Mi havis okazon vidi kaj interne admiri unu el ili. Dum la malmulta tempo disponebla, oni povis montri al ni nur la komunajn aranĝojn: kulturan domon, kun grandega biblioteko, vastan halon, por paroladoj kaj filmoprojekcioj, lernejon k. t. p. Antaŭ ĝi, sur herbejo, kuŝis en tiu momento instruisto, kiu klarigis ion al grupo de infanoj. Proksime estis antaŭlernejo, destinita por infanoj ankoraŭ sen lerneja aĝo. Plaĉis al mi ilia elektra karuselo; sed, unualoke, komprenebble, la amindaj infanoj. La loĝantoj de la kibuco vivas en modera lukso, elspezante nenion por ĝi, ĉar neniu posedas propran monon. Tion kaj multon alian klarigis al mi unu el la gvidantoj, kiu montris ankaŭ florantan kamparon, grandegajn plantejojn, kun ĉiuspecaj fruktoj --kiujn ni volonte gustumis!-- ampleksajn modernajn ĉeval- kaj bovinejojn, kokinbredejojn, kun elektraj kovmaŝinoj kaj dekmiloj da kokinoj, agrikulturajn maŝinojn, laŭ lasta ŝtupo de la progreso. Ni vidis, cetere, elektrejon, kiu produktas kurenton por bezono de la komunumo. Impresis min, iom malgaje, la sciigo, ke tiun elektrejon movas la rivero Jordan. Ne tiel mi prezentis al mi la unuan renkonton kun tiu fama rivero...

Rigardante ĝiajn verdajn ondojn, mi ekparolas al ĝi: «Ho, Jordan, Jordan! Kiel glora vi estis! Jesuo mem estis baptita en via akvo! Kaj nun vi pelas vin al elektrejo? Kia profaniĝo! Hontu!» Mi vokas tiun vorton al ĝi laŭte, en lingvo hebrea: «Buz!» por ke ĝi komprenu... Denove, mi estas hejme, Ĵus venis viziti Israelan la belga reĝino, agrabla sinjorino 82-jara. Oni montris al ŝi la landon, kie ĝoje salutis ŝin la tuta loĝantaro, scianta, ke, dum la germana okupacio de Belgujo, ŝi multe helpis la hebreojn.

Radio disaŭdigas, ke hodiaŭ ŝi estas en Nazaret, kie ŝi partoprenos solenan paskan diservon. Multajn salutojn al ĉiuj!

**MARIE GINZOVÁ** - Shikun Agash, 30-8-KIRJAT JAM B (Israel)

## SOLENAĴOJ EN DIVERSAJ HISPANAJ URBOJ, HONORE AL D-RO ZAMENHOF

Nia landa samideanaro fervore okazigas solenaĵojn, memore kaj honore al D-ro Zamenhof, en lia jubilea jaro. Antaŭ kelkaj monatoj Manresa, la industria kataluna urbo, dediĉis straton al la glora nomo.

Oktobre, Sabadell kaj Cheste, du gravaj fokusoj de nia movado, ankaŭ honoris la memoron de la fondinto per tabuligo de gravaj stratoj. La aragona urbeto Fuentes de Ebro, kiel ni sciigis en nia antaŭa numero, ankaŭ aldoniĝis al la elito da hispanaj urboj, kiuj fervore festas la jubilean jaron, per seriozaj aranĝoj.

En Manresa, la 10an de Oktobro, nia Prezidanto prelegis, en la komforta saloneto de «Lingua Club», antaŭ juneca aŭdantaro, pri «Multlingvismo», fermante tiel la prelegserion per kiu la Esperanta Sekcio de la Klubo honoris la nomon de la Majstro, gajnante plian prestiĝon.

Ankaŭ Sabadell, same fervore akceptis en la sekvanta tago nian Prezidanton, kiu prelegis pri la sama temo, en la pompa prelegejo de la tiea Ŝparkaso, kiu malavare patronis ĉiujn aranĝojn, per kiuj la Esperanta Sekcio de Kooperativo «La Sabadellense» solenigis la Zamenhofan Jubileon. Ni lasu priskribi la okazintaĵojn al la tiea samideano V. Hernández Llusera, vigla kaj kapabla aktivulo: «En la aŭditorio de la nomita institucio paroladis pri aktualaj problemoj, iel tuŝantaj la Internacian Lingvon, jenaj oratoroj: japana ĵurnalistino Joŝiko Kaĵino, Prof. Delfí Dalmau, S-ro Moreno Medrano, D-ro Mariano Solá kaj, laste, D-ro Rafael Herrero, kiu, kvankam jam konata kiel facilparola oratoro, ravis ĉiujn per surprize erudicia parolado, dum mallonga horo kaj duono.»

Sekvantan tagon, 20an de Oktobro, impona samideanaro, ne nur loka, sed el la tuta kataluna teritorio, sekvante la standardistojn, iris al la Urbodomo, kie la klera konsilanto pri Kulturo, D-ro Argemí, akceptis la esperantistajn gravulojn kaj, sekve prezidis kun ili la marŝon, ĝis la baptota strato. Kiam D-ro Argemí malkovris la tabulon, kiu surportas la bareliefon de la Majstro, tondra aplaŭdado miksiĝis al la vigligaj sonoj de la urba muzikistaro. Poste, tiel la Prezidanto de H. E. F., kiel D-ro Argemí, emfazis pri la kultura valoro de la verko de Zamenhof, kaj ankaŭ pri la socia valoro de Esperanto, kiu, kiel povos rememori malnovaj samideanoj, taŭgis, antaŭ multaj jaroj, por efektivigi solidarecan savmovadon, per akcepto kaj flego al aŭstriaj infanoj, minacitaj de malsato. Tiam, la patro de D-ro Argemí mem estis unu el tiuj esperantistoj, kiuj efektivigis tiel noblan agadon, kiu sufiĉas por digne konsideri Esperanton.

Post la ceremonio, la multenombra ĉeestantaro, kiu plenigis la apudan placon, estis regalata per disaŭdigo de tipaj «sardanoj», kiuj dancigis centojn da gejunuloj kaj plenaĝuloj, ĝustritme kaj seriozmiene, kiel decas al bonaj katalunoj, amantoj de siaj tradiciaj kutimoj.

Cento da gesamideanoj kuniĝis poste, por festeni, en tre komforta restoracio; ĉe la tostoj, la Prezidanto de Esperanto-Sekcio de Kooperativo «La Sabadellense», S-ro Ferreres, emociiĝis ĉiujn per siaj elkoraj diroj; D-ro Herrero esprimis sian kontenton pro la kora akcepto kaj brila disvolviĝo de la tuta programo; kaj, ne povante kisi ĉiujn, li tion faris al la ridetanta bebo de Pepita Criach, ĵus veninta el Norvegujo, kie ŝi loĝas. Ĉiuj aplaŭdis entuziasme, kaj sekve priatentis la mallongan, sed sukoplenan alparoladon de D-ro Solá, kiu, kiel kutime, ravis la aŭdantaron per siaj trafaj kaj elokventaj periodoj. Ĉiuj oratoroj honoris la memoron de Zamenhof kaj lian mirindan verkon.

Resume: la kataluna programo, honore al la Majstro, disvolviĝis brile kaj celtrafe, konsistigante fekundan semon por la estonto, en la bela kataluna regiono.

—

Priskriba letero de F-ino Inés Gastón sciigis nin pri granda sukceso, okaze de la malkovro de strattabulo, kun la nomo de D-ro Zamenhof, en la aragona urbeto Fuentes de Ebro. La tuta loĝantaro kaj grava kvanto da zaragozaj samideanoj ĝuis entuziasmajn horojn. Post la ceremonio, okazis akademia kunveno, dum kiu la Urbestro F. Abadía, Prof. M. Sancho Izquierdo kaj advokato Rafael Gastón emfazis pri la meritoj de la kreinto de Esperanto. La sukceso estis tiel pozitiva, ke la tuta loka instruistaro lernos tuj nian lingvon por instrui ĝin al la tiea lernantaro, kun protekto de la urbestraro, kiu oportune helpos kaj kuraĝigos la aferon.

La semo falis en tre favora grundo!

# STRANGA AFERO DUM KONGRESO DE «VIVANTA LATINO»

***Kun la morala aŭtoritato, kiun pri la temo ĝi havas, nia estimata kolego «Espero Katolika» en sia numero 495 (Oktobro 1959) aperigis tre interesan artikolon, kiun ni represas ĉi-sube:***

La dua internacia Kongreso de «Vivanta Latino» okazis en Lyon (Francujo) kun la partopreno de 135 latinistoj el 18 landoj. La latino devas esti «modernigata» de la latinistoj mem, kiuj zorgu, ke ĝia instruado estu pli alloga, kaj ĝi fariĝu la internacia lingvo por scienculoj kaj teknikistoj. UNESKO devos helpi por atingi tiun celon.

Jen proksimume do la tuta enhavo de la rezolucioj!

Estu dirite, ke la akcepto de tiuj rezolucioj ne okazis sen kvereloj: oni interbatalis pri la ĝusta prononco de la latina lingvo; nome, kies prononco estas la plej bona, do, la «oficiala», en kio, kompreneble, altrudis sin la naciaj sentoj. Ekzemple, la itala profesoro Riccardo Avallone, de la Universitato de Romo, defendis la «italan» prononcon; en «itale» prononcita latino, li kondamnis la «pseŭdo-klasikistojn» kaj asertis, ke estas ridinde sekvi alian prononcmanieron ol tiun, kiun oni uzas en Italujo de jam 1500 jaroj. La franca profesoro Robert Schilling, en tre akraj vortoj, atakis lin je nomo de la plimulto, kiu deziras paroli la latinan lingvon, kiel oni kutimis fari tion en Romo, dum la tempo de Cicerono; la digna profesoro estis tiel indignita, ke li tute forgesis la regulon de la kongreso, ke oni rajtas paroli nur latine, kaj li kontraŭbatalis sian italan kolegan en... la franca lingvo!

Je ĉi tiu kriza punkto, kiam la unueco estis en vivdanĝero, subite venis helpo —kaj eĉ el la «malamika» kampo—. Du francaj delegitoj montriĝis esperantistoj, nome: F-ino Marie Bonafons, el Avignon, profesorino de latina lingvo, kiu faris propagandon por Esperanto, kaj sac. Henri Metzger, el Troyes, subtenanta ŝiajn proponojn.

Tiam, la ekscitiĝo fariĝis tiel granda, ke fintine la svisa profesoro Mas Adam klopodis trankviligi la ĉeestantaron, laŭtlegante el la leteroj de Seneca al ties frato Galleo! Kaj, kiel en analogaj kazoj ofte okazas, la kontraŭstaro de la «malamiko», la «danĝero» por la sankta afero, k. t. p. repacigis la interbatalantojn, kiuj, fine, en harmonio kaj unueco, akceptis la rezoluciojn. La sekvonta kongreso okazos post du jaroj, sed la sekretario ricevis tre specialan komision: li zorgu, ke tiam neniu esperantisto enŝteliĝu!

Kompatinda sekretario, li certe ne dormos dum du jaroj...

Se la afero ne estus tiel bedaŭrinda, ĝi certe estus priridinda!

---

# ● GRAVA TASKO PLENUMENDA DE LA NEDERLANDA ESPERANTISTARO ●

## GRANDSKALA PETICIO AL LA REGISTARO POR ENKONDUKO DE ESPERANTO EN LA LERNEJOJN

***Fine de pasinta Septembro, kongresis en la historia urbo Utrecht la nederlanda kolegaro. La kongresa prezidanto, S-ano A. F. van Haren, en sia malferma parolado diris, inter alio: «Evidentiĝas, ke D-ro Zamenhof meritas apartan rememorigon dum tuta jaro, ĉar li postlasis al la mondo heredaĵon, kies valoro estas ankoraŭ nemezurebla. Tial, la esperantistoj ne povas sin permesi nur feste rememorigi D-ron Zamenhof en propra rondo. La centjara datreveno devas sin manifesti eksteren. Sekve, en la printempo, okazis renkontiĝo en Oosterbeek, kun stud-karaktero, kaj nun, en Utrecht, demonstracia kongreso, kiu direktas sin unualoke al instruistaj instancoj kaj aŭtoritatoj, por ke Esperanto baldaŭ estu instruata en la lernejoj». La «Peticio» prezentota al la Ministro de Instruado devas substreki tiun deziron. La Nederlanda Centra Komitato Eeperantista montras tiel sian ekzistorajton ĉi-jare pli ol iam antaŭe. Ĝi estas sur la bona vojo kaj ĝiaj aktivecoj estas tre gravaj. La Registaro devas esti konvinkata, ke «Esperanto vivas en la nederlanda popolo», ĉar la registara tasko ne estas altrudi Esperanton al la popolo, sed nur per leĝo plenumi ĝiajn dezirojn. La nova agado de la Institucio havas la celon pruvi al la Registaro, ke la enkonduko de Esperanto en la lernejojn estas deziro de multaj. Tiucele, ĉiuj nederlandaj samideanoj ricevis liston, sur kiu oni kolektu 15 subskribojn de homoj, kiuj favoras la instruadon de Esperanto en la lernejoj. Grave subtenas kaj faciligas tiun taskon la institucio «Esperanto ĉe la Instruado»; kiel oni povis konstati, la direktorino, C. M. Burger, montriĝas senlaca aktivulino. El propraj multjaraj spertoj, kiel profesorino de franca lingvo, same kiel esperantistino, ŝi opinias dezirinde anstataŭi en la elementa lernejo la instruadon de fremda lingvo per Esperanto. Tiu pozitiva agado de niaj nederlandaj amikoj estas vere salutinda. Antaŭen!***

> *Oni povas eviti la kritikon, dirante nenion, farante nenion kaj... estante mem nenio!* **La Rochefoucauld.**

## SPRITO ESTAS HOMA KVALITO

Kuracisto estis urĝe vokata por paciento, kiu ege suferis pro forta dorno enigita ĉe la gorĝo. La kuracisto tre lerte kaj rapide sukcesis forigi la pikilon. Post tiel feliĉa operacio, la kliento demandis:

—Kiom mi devas pagi?

Al kio la doktoro respondis:

—La duonon de tiu sumo, kiun tre volonte vi estus paginta, kiam la dorno ankoraŭ ŝiris vian gorĝon.

—

—Kio okazas, ke vi aspektas tiel malĝoja?
—Mi suferas je amnezio.
—Ba! Estu eltenema; forgesu tion...

—

—Diru, Peĉjo; kiom aĝas persono, kiu naskiĝis komence de la nuna jarcento?

—Tio dependas, ĉu tiu persono estas viro aŭ virino, kompreneble...

—

En leciono pri Botaniko, profesoro demandas al distriĝema lernanto:

—Kia estas ĉi tiu herbo?

—Mi ne scias.

—Ĉu vere? Ĉu efektive vi ne konas la medikagon? Ho, vi estas azeno.

—Tute ne, sinjoro profesoro, se mi estus azeno, tuj mi estus koninta tiun herbon.

### ESTAS SCIINDE, KE,..

En afrika teritorio, angla policisto, kiu konas tre bone la Biblion, sukcesis aresti kontrabandistojn, aplikante tekston de la Sankta Skribo. La eksterleĝuloj kutimis uzi por siaj *negocoj* kelkajn azenojn; unu el ili estis kaptita de policisto, kiu gardis ĝin plurajn tagojn sen manĝo, liberigante ĝin poste, same kiel skribis la profeto Jezaja: «Bovo konas sian aĉetinton, kaj azeno la manĝujon de sia mastro». Tiel, la malsata azeno rekte kondukis la Policon, ĝis la kaŝejo de la kontrabandistoj.

—

Eksperimentoj, faritaj de naturistoj, pruvis, ke la heliko, tiu humila molusko, povas surporti kaj transporti, pezon de 250 gramoj, sen ĝeno nek laciĝo, Ĉar ordinara heliko pezas ok gramojn, proksimume, tia ŝarĝo egalas tridek-kvin fojojn al ĝia pezo. Homo, kiu pezus cent kilogramojn, por fari la saman penon, devus transporti trimil-kvincent kilogramojn.



## De tro multa scio krevas la kranio

### SFINKSA ANGULETO

#### MATEMATIKO EN MALLIBEREJO

—Kiom da tempo vi troviĝas en la malliberejo? punato demandis al alia.

—Nu, kalkulu vi mem. Mi pasigis jam sesonon de tiu tempo en la ŝtonrompejo; kvinonon en la teksejo, kaj kvaronon en la biblioteko. Sed, krom tio, ankoraŭ mankas 23 monatoj por la liberiĝo.

**Por kiom da tempo estis la puno?**

**Ĝusta solvo gajnos unu poenton, ĝis 20. Decembro**

### SOLVO PRI LA HORLOĜO EN LA PASINTA NUMERO

***Dum la sekvantaj dekdu horoj, ili renkontiĝos 11 fojojn: je la 1.ª horo, 5 minutoj, 5 sekundoj; je la 2.ª horo, 10 minutoj, 10 sekundoj, k. t. p. ĝis kompleta turno.***

### ANKORAŬ POST JARCENTOJ...

Dank' al la ampleksa verkaro de Shakespeare, pli ol duonmiliono da personoj: eldonistoj, presistoj, librovendistoj, aktoroj, k. t. p. gajnas sian vivsubtenon.

Jen ekzemplo de vere senmorta gloro!

## OMAĜO

**Al D-ro L. L. Zamenhof**

Centjaro pasis post naskiĝo
De l' kara Majstro nia...
Sur ni, pro Li, feliĉ' diluvas
Ĉar Esperanto la taŭgecon pruvas
Por lig' internacia!

El nia koro, dank' efluvas
Al kara Majstro nia...
De l' lingvo kreskis la prestiĝo:
Forumo de l' scienc', manifestiĝo
Por lig' internacia!

Honoron al la geniulo,
Al kara Majstro nia...
Lia spirito nin injektas,
La tuthomaron vere ĝi konektas
Per lig' internacia!

Glorkronon la estimo teksas
Al kara Majstro nia...
Li sin dediĉis al kunulo,
Li lingvon kreis, sen merit-postulo,
Por lig' internacia!

Originale verkis
**I. SCHOON - Haarlem** (Nederlando)

## NOVAJ TURISMAJ BROŜUROJ

**FAKTOJ PRI GERMANUJO.** **Eldono de la Gazetara kaj Informa Oficejo de la Germana Federacia Registaro. Senpage havebla ĉe Franz Steiner-Verlag, Bahnhofstrasse, 3 - WIESBADEN**

Post la trafa kolekto de «Faktoj» pri la skandinavaj landoj, nova ero aldoniĝas al la serio. Sed, ĉi tiu luksa broŝuro, fakte ĉarma libro, prezentas konkretajn faktojn pri la evidenta progreso de la Germana Federacia Respubliko, laŭ maniero tiel loga, dank al la unuaranga kvalito de la germana presarto, ke la tuta verko estas belega albumo, garnita per adekvataj bildoj kaj vinjetoj, kun trafa kaj interesa teksto en bonega stilo, ĉar ja ne vane la lingvon kontrolis la Lingva Sekcio de Germana Esperanto-Asocio, plej kompetente.

Kiel speciala eldono, okaze de la pasintjara Universala Kongreso en Mainz, ĝi estas multvalora donaco de la Germana Federacia Registaro al la eksterlandaj esperantistoj, kiuj, tute certe, scios danki tiun ĝentilaĵon per atenta tralegado.

---

**ESSEN VOKAS VIN!** Sur mia skribotablo kuŝas granda koverto; alloga bildo en ĝia interno altiras mian atenton. Rapide, mi deprenas la enhavon: Jen faldfolioj, turismaj prospektoj, bildkartoj, informiloj kaj multaj bildoj, per kiuj oni povas vidi ĉiujn plej elstarajn vidindaĵojn de la nunjara ĉefurbo de la Germana Esperantistaro, ĉar Essen estis scenejo por la 37ª Germana Kongreso de Esperanto, en la Zamenhof-Jaro, dum pasinta Pentekosto: 16-18 Majo.

Dum la Kongreso, ĝiaj membroj havis la taskon honori bonan amikon de D-ro Zamenhof, kiu malavare helpis Esperanton en la malfacila unua tempo. Tiu sindonema kaj bonvola samideano estis la Essen-ano H. W. Trompeter. (1839-1901)

Laŭ la trafa kolekto de tiel belaj bildoj, oni rekonas, ke la tieaj samideanoj pravas, kiam ili emfaze deklaras, ke «Essen valoras vojaĝon!» Jes, tute vere, ĉar la urbo montriĝas al la vizitantoj riĉa, bela, magnete loga, laŭ sia trafa aranĝo de loĝkvartaloj, imponaj fabrikoj, parkoj, avenuoj, hoteloj kaj muzeoj, kiel centro de kulturo.

Cetere, la Essen-anoj estas laboremaj kaj gastamaj. Tial oni ne hezitu iri tien, ĉar oni bone scias jam, ke la urbo kaj la tieaj samideanoj atendas ĝentile ĉiulandajn amikojn.

**R. ALBERO - Burjasot (Valencia)**

**MEZE EN GERMANUJO. MEZE EN LA 20ª JARCENTO.** Esperanta kompilo, eldonita de la Federacia Ministerio por Tutgermanaj Demandoj, en Bonn, pri la zonlimo.

**ESPERANTO, FENESTRO AL LA MONDO.** Faldfolio eldonita de la Arnhema Turistoficejo, kun karteto pri la ekspozicio de skulptaĵoj en tiu urbo. Havebla ĉe:
V. V. V. — Stationsplein, 45, Arnhem (Nederlando)

**LANDKARTO PRI SVEDUJO.** Belega multkolora broŝuro en Esperanto, kun granda landkarto. Ricevebla de Svenska Turisttrafikförbundet, Stockholm (Svedujo) Petante ĝin oni klare indiku, ke temas pri broŝuro en Esperanto.

**MALMÖ.** Multkolora faldprospekto en Esperanto, kun pluraj bildoj, urbokarto kaj historia rerigardo pri la tria urbo de Svedujo. Havebla senkoste ĉe:
Malmö Turistttrafikföreeingen, Malmö (Svedujo). Nepre indiku, ke vi deziras la broŝuron eldonitan en Esperanto.

**WIEN.** Faldprospekto kun aldonitaj folioj en Esperanto pri la Aŭstria ĉefurbo. Havebla kontraŭ unu respondkupono ĉe: Internacia Esperanto Muzeo, I. Hofburg, **Wien** (Aŭstrio).

**HOMBURG.** Faldprospekto kun folio en Esperanto, eldonita kaj ricevebla de Stadt und Verkehrsverein
Homburg-Saar (Germanujo).

**PER LA FERVOJO TRA AŬSTRIO.** Gvidilo 12-paĝa tute en Esperanto, eldonita de la Aŭstria Federacia Fervojaro. Havebla kontraŭ unu respondkupono ĉe:
Internacia Esperanto-Muzeo, I. Hofburg
**Wien** (Aŭstrio).

**FIRENZE KAJ ĜIA PROVINCO.** Tre bela 20-paĝa faldfolio, kun interesa teksto kaj riĉkoloraj ilustraĵoj kaj mapo de la provinco. Ĉi tiu faldfolio estas vera artaĵo, kiu certe atestas pri favora sinteno al Esperanto, fare de la italaj turismaj instancoj. Oni povas ĝin peti, aldonante respondkuponon, al
**Ente Provinciale per il turismo. - FIRENZE**

### TUTE SENPAGE!

Estas ankoraŭ akirebla la interesa ilustrita faldfolio pri Valencio, laŭ kompilo de redaktoro L. Hernandez

**Petu ĝin rekte al**

**Sociedad Valenciana Fomento del Turismo**
**Bajos del Ayuntamiento - VALENCIA (Hispanio)**

**¡SE ESTÁ TERMINANDO EL AÑO DEL DR. ZAMENHOF!** *Pero por la marcha inexorable del tiempo, estamos ya en los umbrales de otro año nuevo. Para los esperantistas, esto significa intensificar los esfuerzos, a fin de aprovechar el favorable ambiente creado, por las diversas solemnidades celebradas, durante el año que acaba. El primer deber, pues, en este sentido, como garantía de continuidad, es pagar la cuota a la Federación, que, con las nuevas tarifas, se deja a la buena voluntad de cada asociado, según las siguientes variedades:*

**Socio numerario: 25 ptas. - Socio abonado: 60 ptas - Socios protectores: 100 ptas o 150 ptas.**

*El pago de cada una de estas cuotas da derecho a recibir* UN *ejemplar del* BOLETIN; *quien desee recibir regularmente algún otro ejemplar suplementario deberá pagar 25 pesetas más, sobre su cuota, por cada ejemplar extra encargado. Háganse constar con claridad estos pormenores.*

## XXI CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO EN PONTEVEDRA - 21-23 Julio 1960

**La designación de Pontevedra, para albergar el vigésimo primer Congreso Español de Esperanto, fué acogida en Málaga, el verano pasado, con extraordinaria satisfacción. Y, como entonces, se espera que las Autoridades presten también todo su apoyo a nuestra reunión anual.**

**Confiamos que los días elegidos, del 21 al 23 de Julio, sean adecuados para que puedan asistir todos cuantos anhelan comprobar la marcha ascendente de nuestras aspiraciones idiomáticas, en la hermosa región gallega. Por otra parte, la extraordinaria belleza del paisaje galaico y el incomparable atractivo del tipismo céltico han de complementar, debidamente, la fuerza de la ilusión por tomar parte directa en el próximo Congreso.**

**Para muchos, ha de ser un gran aliciente la vecindad de Portugal, en donde se desenvuelve, sin ruidosas manifestaciones, un respetable y entusiástico movimiento esperantista, cuyos miembros, en gran parte, vendrán a Pontevedra, que por ello se convertirá en capital congresal ibérica... Sabemos ya que aragoneses, valencianos y catalanes preparan viajes colectivos, para posibilitar, a reducido precio, cómodos e instructivos desplazamientos, a través de la península. Y, en Galicia, Santiago, Coruña, la isla de la Toja, la ría de Vigo, etc. son, para todos, nombres mágicos, que harán decidir, desde ahora, incluso a los más tibios. En nuestro próximo número publicaremos el texto íntegro del programa que, por ¡lo que sabemos, ha de ser magnífico.**

### ANTAŬ LA REAPERO DE «ESPERANTOLOGIO»

Por novaj esperantistoj kaj neabonantoj, estas interese scii, ke ĉi tiu revuo ĉefparte aperigas traktaĵojn, bazitajn sur originalaj esploroj en la kampo de la Esperanta lingvistiko. Sub redakto de komitato el eminentaj esperantologoj-lingvistoj, la revuo aperas per kajeroj 48-80 paĝaj, formantaj volumojn 250-300 paĝajn, provizitajn per indekso de la temoj kaj aŭtoroj. La kajeroj estas eldonataj laŭ la cirkonstancoj: unu volumo kovrante ĉ. tri jarojn, verŝajne. La prezo varias iom, sub konsidero de la aĉetpovo en diversaj landoj.

Por Hispanio la prezo estas de 300 pesetoj. Interesatoj sendu la kotizon por la dua volumo, kun sia adreso, al la hispana peranto: **V. HERNANDEZ LLUSERA**

Avda. Ejército Español, 59- **Sabadell** (Barcelona)

Interesatoj aĉeti la jam aperintan *unuan* volumon de «Esperantologio» (ĝis elĉerpiĝo) bonvole pagu al la peranto ĝian prezon, kiu estas 5/7 de la prezo por la dua volumo, t. e. 215 pesetoj. Profitu la okazon!



## PARA NUESTRO BOLETIN

(Donativos correspondientes a Noviembre 1959)

| | | |
|---|---|---|
| Suma anterior | 6.416 | Ptas. |
| F. Abella - Barcelona | 25 | » |
| F. Máñez - Zaragoza | 25 | » |
| F. Alvarez - Madrid | 25 | » |
| J. Flaquer - Barcelona | 40 | » |
| E. Tudela - Valencia | 50 | » |
| M. Bousells - Barcelona | 5 | » |
| F. Alsina - Barcelona | 70 | » |
| S. Alberich - Barcelona | 40 | » |
| J. Roig - Barcelona | 40 | » |
| M. Alsina - Barcelona | 10 | » |
| F. Santacruz - Barcelona | 10 | » |
| Junulara Sekcio | 60 | » |
| V. Ortiz - Zaragoza | 10 | » |
| L. Armadáns - Barcelona | 10 | » |
| L. A. Ramírez - Vera | 50 | » |
| J. Anglada - Barcelona | 50 | » |
| V. Marín - Barcelona | 50 | » |
| Cooperativa «La Sabadellense» | 500 | » |
| La Esperanta Grupo, el vojaĝkostoj ĝentile neakceptitaj de D-ro Herrero, okaze de la inaŭguro de Zamenhof-strato | | |
| Total | 7.486 | Ptas. |

*Es de suponer que, con la próxima lista, se redondeará una bonita suma, como digno broche de este año tan nuestro. ¡Animo!*

## TESORERIA

Relación de los números agraciados: 26 de Octubre. Núm. 21992. No se asigna por no existir poseedor del 92.

25 de Noviembre. Núm. 586. No se asigna por no existir poseedor del 86.

PERIS - GRAN VIA M. TURIA, 28 - VALENCIA